Jean de La Fontaine,

# La korvo kaj la vulpo

*tradukita de Pejno Simono*

Fraŭlo Korvo, jen arbopinte,
Tenis enbeke fromaĝon.
Fraŭlo Vulpo, tiun spurinte,
Voĉis allogan omaĝon.
"He, saluton, sinjoro Korvul'.
Vi bela! Vi rava! Vi ĝu' por l' okul'!
Sincere, se via fanfaro
Egalus al via plumaro,
Vi estus fenikso de l' boska popol'."
La Korvo ĝojegis ĉe tiu parol'.
Li por najtingali
La bekon malŝlosis, igante la predon elfali.
La Vulpo ĝin kaptis kaj diris "Bona moŝto,
Ke flatado je l' kosto
De l' aŭdintoj bonvivas, lernu vi nu.
Valoras fromaĝon do tiu instru'."
La Korvo, konfuza kaj honta,
Malfrue nun ĵuris pri klero estonta.

. . .

Jean de La Fontaine,

# Le Corbeau et Le Renard

Maître Corbeau, sur un arbre perché,
Tenait en son bec un fromage.
Maître Renard, par l'odeur alléché,
Lui tint à peu près ce langage :
«Hé ! bonjour, Monsieur du Corbeau.
Que vous êtes joli ! que vous me semblez beau !
Sans mentir, si votre ramage
Se rapporte à votre plumage,
Vous êtes le Phénix des hôtes de ces bois.»
A ces mots le Corbeau ne se sent pas de joie ;
Et pour montrer sa belle voix,
Il ouvre un large bec, laisse tomber sa proie.
Le Renard s'en saisit, et dit : «Mon bon Monsieur,
Apprenez que tout flatteur
Vit aux dépens de celui qui l'écoute :
Cette leçon vaut bien un fromage, sans doute.»
Le Corbeau, honteux et confus,
Jura, mais un peu tard, qu'on ne l'y prendrait plus.

. . .

Jean de La Fontaine,

# Der Rabe und der Fuchs

*tradukita de Theodor Etzel.*

Herr Rabe auf dem Baume hockt,
Im Schnabel einen Käs.
Herr Fuchs, vom Dufte angelockt,
Ruft seinem Witz gemäß:
»Ah, Herr Baron von Rabe,
Wie hübsch Ihr seid, wie stolz Ihr seid!
Entspricht auch des Gesanges Gabe
Dem schönen schwarzen Feierkleid,
Seid Ihr der Phönix-Vogel unter allen!«
Der Rabe hört's mit höchstem Wohlgefallen,
Läßt gleich auch seine schöne Stimme schallen.
Da rollt aus dem Rabenschnabel der Fraß
Dem Fuchs ins Maul, der unten saß.
Der lachte: »Dank für die Bescherung!
Von mir nimm dafür die Belehrung:
Ein Schmeichler lebt von dem, der auf ihn hört.
Die Lehre ist gewiß den Käse wert.«
Der Rabe saß verdutzt und schwor:
Das käm ihm nicht noch einmal vor.

. . .

*Traduko de la Franca poemo "Le Corbeau et Le Renard" de* JEAN DE LA FONTAINE *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de* PEJNO SIMONO *(Simon Edward Adrian Payne, ∗1941-12-23).*

*Arg-975-1964 (2014-03-13 13:17:21)*

*Pri la tradukinto vidu la retejojn* `http://fr.wikipedia.org/wiki/Simon_Edward_Adrian_Payne` *respektive* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Pejno_Simono`.

*Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas* JEAN DE LA FONTAINE *(∗1621-07.08 – †1695-04.12).*

*Arg-975-1963 (2014-03-13 13:10:40)*

*Pri la verkinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Jean_de_La_Fontaine`.

*Traduko de la Franca poemo "Le Corbeau et Le Renard" de* JEAN DE LA FONTAINE *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en la Germanan de* THEODOR ETZEL. *(civila nomo: Theodor Schulze, ∗1873-01-09 – †1930-08-19).*

*Arg-975-1965 (2014-03-13 21:06:31)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en* `http://www.zeno.org/Literatur/M/La+ontaine,+Jean+de/Versfabeln/Fabeln/Der+Rabe+und+der+Fuchs`. *Aliaj germanigo de poemo de Jean de la Fontaine troviĝas en* `http://www.zeno.org/Literatur/M/La+Fontaine,+Jean+de/Versfabeln/Fabeln`. *Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://de.wikisource.org/wiki/Theodor_Etzel`.